# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

**Nº 10** **Aŭgusto** **1924**

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al „ESPERANTO" ☆ Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE



**TEKSTO:** La sesa kunsido de la Internacia Labora Konferenco. — Kunveno de la Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo. — Laboro de Infanoj en Usono. — Konfirmo de Konvencioj. — Pollando konfirmas dektri Internaciajn Laborajn Konvenciojn. — Konsila Komitato pri Industria Higieno. — Nordena Migrado de la Negro en Usono.


## La sesa kunsido de la Internacia Labora Konferenco.

La sesa kunsido de la Internacia Labora Konferenco malfermiĝis en Genève, la 16an de junio 1924. Partoprenis 124 delegitoj de 39 ŝtatoj, akompanataj de 160 teknikaj konsilantoj. Ĉeestis la malfermon la membroj de la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj, kiu kunsidis en la momento en Genève, kaj S-ro Beneŝ, la Prezidanto de la Konsilantaro, alparolis la kunvenon. La Konferenco unuanime elektis, kiel Prezidanton, S-ron Branting, la konatan svedan ŝtatiston.

*

### La Okhora Labortago.

Okaze de la diskuto de la raporto de la Direktoro pri la laboro de la Oficejo dum la pasinta jaro, fariĝis debato pri la okhora labortago, en kiu partoprenis multe da delegitoj laboristaj, registaraj kaj patronaj. La laboristaj delegitoj insiste postulis la konfirmon de la projekto de konvencio de Washington (ĝis nun konfirmita nur de kvin ŝtatoj), protestis kontraŭ la klopodoj en Germanio por pliigi la laborhorojn pretekste de la pago de rebonigoj, kaj proponis rezolucion aludantan la problemon de la rebonigoj kaj la raporton de la spertuloj (raporto Dawes), kaj petantan la Administran Konsilantaron de la Internacia Labora Oficejo serĉi, per kiu pero kaj metodo oni povus atentigi la Komisionon de la Rebonigoj pri la internaciaj sociaj sekvoj de la realigo de la programo alprenita de tiu Komisiono. Parolis en tiu debato la franca ministro de Laboro, S-ro Godart, kiu anoncis, ke lia Registaro estas preta por konfirmi la Washingtonan konvencion. La delegito de la brita Registaro ankaŭ deklaris la intencon de sia Registaro, kiel eble plej frue antaŭenigi leĝprojekton, kiu, se ĝi estas akceptita, ebligos la konfirmon de la Konvencio. La germana Registara delegito insistis pri la neceso de la pliigo de laborhoroj en la nunaj cirkonstancoj en Germanio. Kontraŭe la germana laborista delegito forte subtenis la vidpunkton de la laborista grupo. La brita registara delegito kaj aliaj parolantoj rimarkigis, ke la raporto de la spertuloj ne antaŭvidas la pliigon de la laborhoroj en Germanio. Lia Eklezia Moŝto Nolens, delegito de la nederlanda Registaro, proponis traktadojn inter la ĉefaj industriaj ŝtatoj por la konfirmo de la konvencio. La diskuto finiĝis per grava parolado de S-ro Thomas, Direktoro de la Internacia Labora Oficejo. La parolanto rimarkigis, ke la aliaj ŝtatoj klopodis por solvi siajn problemojn de rekonstruado, ne aliigante sian laboran leĝaron, sed ke Germanio diras, ke ĝi ne povas plenumi la rebonigojn kaj fari la necesan ekonomian rekonstruon ne pliigante la laborhorojn. Sed estas necese trovi iun garantion, ke la rezultatoj de la pliigo de laborhoroj estu aplikataj sole al la pago de rebonigoj, garantio, kiun oni povus multe pli facile havigi, se la okhora konvencio estus konfirmita de Germanio kaj la aliaj grandaj industriaj ŝtatoj. Estas tamen evidente, ke la spertuloj en sia raporto, taksante la pagpovon de Germanio, ne antaŭvidis pliigon de laborhoroj kaj speciale ne intencis favori malegalecon inter Germanio kaj aliaj landoj en tiu rilato. Estas fine la Komisiono de la Rebonigoj, kiu povas difini la kondiĉojn laŭ kiuj la konkludoj de la spertuloj devas esti aplikataj. Sed, eĉ se la Komisiono de la Rebonigoj okupiĝos pri la laborhoroj kaj pri la ekonomia ekvilibro, la garantio tiel donita restos garantio ankoraŭ necerta. Estas nur unu metodo vere efika por certigi en ĉiuj landoj la starigon kaj la subtenon de la okhora labortago; tio estas la konfirmo de la konvencio. Ĉi tie aperas nova espero en la deklaroj de la registaraj delegitoj de Francio, Granda Britlando kaj Belgio. Ŝajnas ke estas eble organizi konkordan movadon inter la grandaj industriaj ŝtatoj por la konfirmo de la konvencio. Kiam, per komuna decido, Francio, Anglolando, Belgio, eble ankaŭ Nederlando, estos konfirmintaj, ĉu Germanio povos longe heziti? La traktadoj inter ŝtatoj proponitaj de Lia Eklezia Moŝto Nolens povas esti komencataj, kaj la Internacia Labora Oficejo povas uzi sian diplomation por tiu celo, sed ĝi devas esti subtenata en la tri grupoj de la Konferenco — Registaroj, patronoj kaj laboristoj — per arda fido al la efikeco de tiu granda reformo.

*

### La demandoj en la tagordo.

Kiel jam scias la legantoj de la „Bulteno", la Tagordo de la Konferenco enhavas la jenajn demandojn:

1. Disvolvigo de facilaĵoj por la utiligo de la libertempo de laboristoj;
2. Egaleco de traktado por naciaj kaj eksterlandaj laboristoj pri kompenspago por akcidentoj;
3. Semajna interrompo de laboro dum 24 horoj en vitrofabrikejoj uzantaj basenfornegojn;
4. Nokta laboro en bakejoj.

Ĉiuj tiuj demandoj estis plene diskutitaj en specialaj komitatoj kaj en plenaj kunsidoj de la Konferenco, kaj fine la Konferenco balotis Rekomendon pri la unua temo. Pri la aliaj tri demandoj ĝi balotis projektojn de konvencioj (ankaŭ aldonan Rekomendon pri Egaleco de traktado), sed pri tiuj aferoj la Konferenco sekvis la novan proceduron deciditan en la Kvara Kunsido en 1922, tio estas, la projektoj de konvencioj kaj rekomendo estis provizore akceptitaj, sed la definitiva voĉdono estis prokrastita ĝis la plej proksima Kunsido.

### Senlaboreco.

La Konferenco ankaŭ diskutis la raporton de ĝia Komitato pri Senlaboreco kaj balotis rezolucion aprobantan la kunvokon de Internacia Konferenco de Laboraj Statistikistoj kaj rajtigantan la daŭrigon kaj plivastigon de la enketoj pri senlaboreco kaj de la kunlaboro pri tio kun la Ekonomia kaj Financa Organizaĵo de la Ligo de Nacioj.

*

### La Itala Laborista Delegito.

Okaze de la raporto de la Komitato por la Kontrolo de Rajtigaĵoj fariĝis viva diskuto pri la protesto de la itala Ĝenerala Konfederacio de Laboro kontraŭ la nomado de la itala laborista delegito, kiu reprezentas la Konfederacion de Naciaj Korporacioj (la faŝistaj sindikatoj). La motivo de la protesto estis, ke la faŝista organizaĵo ne estas vera laborista organizaĵo, ĉar ĝi ampleksas ankaŭ labordonantojn. La plimulto de la Komitato rekomendis la malakcepton de la protesto, ĉar la sama demando estis prezentita kaj decidita lastan jaron. La malplimulto de la Komitato (S-ro Jouhaux, laborista reprezentanto) malkonsentis. Finfine la Konferenco decidis, per 55 voĉoj kontraŭ 32, akcepti la rajtigaĵojn de la itala laborista delegito.

*

### Karbunkolo.

La legantoj de la „Bulteno" jam konas la laboron de la Konsila Komitato pri Karbunkolo. Komitato de la nuna Konferenco studis la konkludojn de la Konsila Komitato kaj prezentis raportojn al la Konferenco. La raporto de la plimulto esprimas la opinion, ke ne estas eble atingi internacian konsenton pri desinfekto de lano kaj haro destinitaj por la teksindustrio. Ĝi proponas, tamen, ke la demando pri Projekto de Konvencio pri deviga desinfekto de haro, kornoj kaj hufoj, kaj Rekomendo pri regularo pri ostoj, kornoj kaj hufoj, estu metata en la tagordon de iu estonta Kunsido, kaj ke la Internacia Labora Oficejo faru studon pri la protekto de transportlaboristoj kontraŭ infekto. Raporto de la malplimulto rekomendis la konsideradon de Projekto de Konvencio pri desinfekto de lano kaj haro destinitaj por la teksindustrio. La Konferenco akceptis la raporton de la plimulto.

*

### Rezolucioj.

La Konferenco decidis transdoni al la Administra Konsilantaro plurajn rezoluciojn prezentitajn al la Kunveno, kiuj pritraktas la jenajn temojn: Enketo pri industria akordigo kaj arbitracio; enketo pri libereco de asociado; la internaciaj sociaj sekvoj de la proponoj de la Spertuloj pri Rebonigoj (la rezolucio jam aludita proponita de la laborista grupo); procedo por modifo de Konvencioj); rilatoj de la Internacia Labora Oficejo kun Ruslando.

---

## Kunveno de la Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo.

La Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo kunvenis en Genève la 12-an kaj 13-an de Junio.

La Konsilantaro ekzamenis la raporton de la Direktoro pri la ĝenerala agado de la Oficejo depost la Aprila kunsido.

Diskuto fariĝis pri la aktuala situacio rilate al la konfirmo de konvencioj. La reprezentanto de la germana Registaro, kaŭze de la maltrankvileco montrita de najbaraj Ŝtatoj, diris, ke la nuna germana leĝfaro respektas la principon de la okhora labortago, kaj ke la esceptaj cirkonstancoj, kiuj estas la rezultatoj de esceptaj cirkonstancoj, estas nur provizoraj. Li ankaŭ diris, ke en pluraj industrioj, ekzemple en la minoj, la vitrofabrikejoj kaj la presejoj, la okhora labortago estas daŭre observata.

*) Vidu „Bultenon", N-ro 2, Aprilo 1923.

Diversaj konsilantoj petis informojn pri la eblaj konsekvencoj de la Konferenco pri Elmigrado lasttempe kunveninta en Roma por la agado de la Oficejo pri elmigrado kaj enmigrado. La reprezentanto de la itala Registaro esprimis la esperon, ke la laboro de la Roma Konferenco faciligos la klopodojn de la Oficejo. Li sciigis la Konsilantaron, ke la rezolucioj de la Konferenco, laŭ decido de la Konferenco mem, estos transsendataj al la Internacia Labora Oficejo. La Konsilantaro dum sia plej proksima kunsido, kiam ĝi posedos la oficialajn tekstojn, povas ekzameni la problemojn, kiujn ili prezentas al la Oficejo.

La Konsilantaro estis sciigita de la pola Registaro pri la malsukceso de la traktadoj inter la pola kaj germana Registaroj pri la transdono de sociaj asekuraj kapitaloj en la parto de Supra Silezio cedita al Pollando. La Konsilantaro decidis starigi la Komisionon el kvin membroj antaŭviditan de la Kontrakto de Versailles. Ĝi nomis la tri spertulojn, kiuj, kune kun reprezentanto de la germana Registaro kaj reprezentanto de la pola Registaro, ekzamenos la kondiĉojn de tiu transdono.

La Konsilantaro poste konsideris la proponon de la Konsilantaro de la Ligo de Nacioj, ke la tasko de la Alta Komisiono por rusaj rifuĝintoj estu transdonata al la Internacia Labora Oficejo. La Konsilantaro nomis kvar el siaj membroj por interrilatiĝi kun la Konsilantaro de la Ligo por akiri la necesajn aldonajn informojn, antaŭ ol decidi.

La Konsilantaro akceptis la raporton de sia Subkomitato pri Konstruo, kiu montras la bonan progreson de la nova konstruaĵo. Ĝi ankaŭ akceptis la raporton de sia Financa Komitato.

---

## Laboro de Infanoj en Usono.

La Senato de Usono aprobis amendon al la Konstitucio, ebliganta la Kongreson (la federacia parlamento) limigi, reguligi aŭ malpermesi la laboron de infanoj malpli ol 18-jaraj. La Reprezentantaro estis jam aprobinta la amendon. Ĝi devas nun esti proponata al la individuaj ŝtatoj de la Unuiĝo por konfirmo, kaj la konfirmo de du trionoj el la Ŝtatoj estas necesa por fari ĝin efika.

Tiu okazintaĵo signifas la finon de grava stadio en longa batalo por la starigo de unuformeco ĉe Usona leĝdono pri la laboro de infanoj. Aktuale la reguligo de infanlaboro apartenas al la kompetenteco de la individuaj Ŝtatoj (48 Ŝtatoj kaj la Distrikto de Kolumbia). Federacia leĝo farita de Kongreso estas deklarita antaŭkonstitucia, kaj oni proponis antaŭ dekok monatoj, fari amendamenton al la Konstitucio ebligantan Kongreson leĝfari pri la afero sendepende de la leĝdono de la Ŝtatoj. La Direktoro de la Internacia Labora Oficejo dum sia vizito al Usono, atestis antaŭ la Subkomitato de la Senato al kiu la propono estis transdonita.

Oficialaj raportoj montras, ke en la jaro 1920 pli ol miliono de infanoj de 10 ĝis 15 jaroj estis okupataj en salajrita laboro en Usono.

En la Senato la senatanoj de naŭ Ŝtatoj kontraŭstaris la amendon, tio estas Alabama, Florido, Georgia, Idaho, Louisiana, Maryland, North Carolina kaj Utah — ses kotonaj, unu tabaka kaj du betsukeraj Ŝtatoj. La reprezentantoj de tiuj Ŝtatoj en la Reprezentantaro voĉdonis same.

La Senatanoj de Texas, Tennessee kaj Arkansas voĉdonis por la amendo. Texas kaj Arkansas estas kotonaj Ŝtato kaj Tennessee produktas kotonon kaj tabakon. Multaj el la reprezentantoj de tiuj Ŝtatoj en la Reprezentantaro kontraŭstaris la amendon. La procentoj de infanlaboro estas 8,6 en Texas, 9,3 en Tennessee kaj 10,7 en Arkansas, ĉiuj pli ol la meza procento kaj inter la 9 plej altaj en Usono.

En du Ŝtatoj, nome Mississippi kaj Virginia, unu kotona Ŝtato kaj la alia la plej granda tabaka ŝtato, unu Senatano voĉdonis por kaj la alia kontraŭ la amendo.

La Ŝtatoj kontraŭstarantaj la federacian reguligon de infanlaboro estas precipe agrikulturaj ŝtatoj. Oni atendas, ke multaj Ŝtatoj kun granda procento de infanlaboro okupata en industrio kaj minado subtenos la amendon, sed ke la ŝtatoj, en kiuj agrikulturo estas la ĉefa intereso de la loĝantaro, kaj kies produktoj estas tiaj, ke infanlaboro estas preskaŭ necesa por ilia ekonomia rikoltado, tio estas la kotonaj, tabakaj kaj betsukeraj Ŝtatoj, kontraŭstaros ĝin.

La plej forta kontraŭstaro, tamen, sin apogos sur la rajtoj de la Ŝtatoj. La ŝtatoj estas tre ĵaluzaj pri siaj rajtoj kaj malfacile cedos al la Federacio la kompetentecon por leĝfari pri reguligo de laboro.

---

## Konfirmo de Konvencioj.

### Latvio.

La latvia Registara delegitaro al la Sesa Kunsido de la Internacia Labora Konferenco sciigis la Internacian Laboran Oficejon per letero de la 27-a de Junio 1924, ke la jenaj procedoj estas faritaj:

La 17-an de Junio la Saeima (Parlamento) rajtigis la konfirmon de la jenaj projektoj de konvencioj balotitaj en la Tria Kunsido de la Konferenco (Genève 1921):

1. Projekto de konvencio pri aĝo por allasi infanojn al laboro en agrikulturo;
2. Projekto de konvencio pri rajtoj de kamplaboristoj je asociado kaj unuigo;
3. Projekto de konvencioj pri semajna tagripozo en industriaj entreprenoj;
4. Projekto de konvencio pri deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj okupataj surŝipe;
5. Projekto de konvencio pri uzo de plumboblanko en pentrado.

La 2-an kaj 6-an de Majo la Konsilantaro de Ministroj aprobis kaj transdonis al la Saeima, por ke ĝi rajtigu la konfirmon de ili, la jenajn projektojn de konvencioj balotitajn en la Unua Kunsido de la Konferenco (Washington 1919):

1. La Okhora Konvencio (kondiĉe, ke ĝi fariĝos efika, kiam ĝi estos konfirmita de la grandaj industriaj ŝtatoj);
2. Projekto de konvencio pri laboro de virinoj antaŭ kaj post akuŝo;
3. Projekto de konvencioj pri minimuma aĝo por allasi infanojn al industria laboro;
4. Projekto de konvencio pri nokta laboro de junuloj en industrio.

La 5-an de Junio la Konsilantaro de Ministroj aprobis kaj transdonis al la Saeima, por ke ĝi rajtigu la konfirmon de ili, la jenajn projektojn de konvencioj balotitajn en la Dua Kunsido de la Konferenco (Genova 1920):

1. Projekto de Konvencio pri minimuma aĝo por allasi infanojn al marŝipa laboro;
2. Projekto de konvencio pri kompenspago por senlaboreco okaze de ŝippereo (kondiĉe, ke ĝi fariĝos efika, kiam ĝi estos konfirmita de la ĉefaj maraj ŝtatoj)
3. Projektoj de konvencio pri la dungigo de maristoj.

*

### Bulgario.

La 6-an de Junio 1924 la Sobranje (la bulgara parlamento) aprobis ĉiujn projektojn de konvencioj kaj rekomendojn balotitajn en la Tria, Kvara kaj Kvina Kunsidoj de la Konferenco.

*

### Kanado.

Leĝprojekto por amendi la Kanadan Ŝipleĝon por efektivigi iujn projektojn de konvencioj balotitajn de la Internacia Labora Konferenco de la Ligo de Nacioj estis prezentita en la Kanada Deputitaro la 1-an de Julio 1924 de S-ro James Murdoch' ministro de Laboro, kaj poste estas aprobita en Tria Legado (Third Reading, tio estas la lasta ekzameno de la projekto antaŭ ol transsendi ĝin al la Senato).

La projektoj de konvencioj, kiujn la leĝprojekto proponas konfirmi, estas:

1. Tiu pri minimuma aĝo por allasi infanojn al marŝipa laboro;
2. Tiu pri kompenspago por senlaboreco okaze de ŝippereo:
3. Tiu pri la minimuma aĝo por allasi junulojn al laboro kiel hejtistoj kaj karbordigistoj;
4. Tiu pri deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj okupataj surŝipe.

*

### Aŭstrio.

La konfirmo de la flanko de Aŭstrio de la jenaj Projektoj de Konvencioj de la Internacia Labora Konferenco estis registrita de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la 12-an de Junio 1924:

1. Projekto de Konvencio limiganta la laborhorojn en industriaj entreprenoj al 8 tage kaj 48 semajne;
2. Projekto de Konvencio pri senlaboreco;
3. Projekto de Konvencio pri nokta laboro de virinoj;
4. Projekto de Konvencio pri nokta laboro de junuloj okupataj en industrio;
5. Projekto de Konvencio pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al laboro en agrikulturo;
6. Projekto de Konvencio pri la rajtoj de kamplaboristoj je asociado kaj unuiĝo;

La Konfirmo de la Okhora Konvencio estas kondiĉa, ke la konvencio fariĝos efika en Aŭstrio, kiam ĝi estos konfirmita en la eŭropaj ŝtatoj de ĉefa industria graveco estantaj Membroj de la Internacia Labora Organizaĵo (t. e. Belgio, Franclando, Germanio, Granda Britlando kaj Italio) kaj ankaŭ de la Ŝtatoj samlimaj kun Aŭstrio, kun kiuj Aŭstrio havas ekonomiajn rilatojn (t. e. Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Svislando).

*

### Danmarko.

La konfirmo de la flanko de Danmarko de la Projekto de Konvencio pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al marŝipa laboro kaj la Projekto de Konvencio pri la minimuma aĝo por allasi junulojn al laboro kiel hejtistoj kaj karbordigistoj, estis registrita de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la 12-an de Majo 1924.

*

### Japanio.

La Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj registris la 7-an de Junio 1924 la konfirmon de la flanko de Japanio de la Projekto de Konvencio pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al marŝipa laboro kaj de la Projekto de Konvencio pri deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj okupataj surŝipe.

*

### Hispanio.

La 20-an de Junio 1924 la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj registris la konfirmon de la flanko de Hispanio de la jenaj ses projektoj de konvencioj:

1. Projekto de konvencio pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al marŝipa laboro;
2. Projekto de konvencio pri kompenspago por senlaboreco okaze de ŝippereo;
3. Projekto de konvencio pri la uzo de plumboblanko en pentrado;
4. Projekto de konvencio pri semajna tagripozo en industriaj entreprenoj;

5. Projekto de konvencio pri la minimuma aĝo por allasi junulojn al laboro kiel hejtistoj kaj karbordigistoj;
6. Projekto de konvencio pri deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj okupataj surŝipe.

*

### Irlanda Libera Ŝtato.

La Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj registris la 17-an de Junio la konfirmon de la flanko de la Irlanda Libera Ŝtato de la projektoj de konvencioj pri la rajtoj de la kamplaboristoj je asociado kaj unuiĝo kaj pri kompenspago por laborakcidentoj en agrikulturo.

*

### Belgio.

La Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj ricevis de Belgio konfirmojn de la jenaj projektoj de konvencioj balotitaj en la Unua Kunsido de la Internacia Labora Konferenco en Washington en 1919:

1. Minimuma aĝo por allasi infanojn al industria laboro;
2. Nokta laboro de junuloj en industrio;
3. Nokta laboro de virinoj.

---

## Pollando konfirmas dektri Internaciajn Laborajn Konvenciojn.

La 21an de junio en la ejo de la Ligo de Nacioj, en Genève okazis interesa kaj grava ceremonio. La pola Registaro prezentis al la Sekretario Ĝenerala de la Ligo konfirmojn de dektri Konvencioj de la Internacia Labora Konferenco.

Ĉeestis la ceremonion la jenaj reprezentantoj de la pola Registaro: S-ro Skrzynski, Eksministro de Eksterlandaj Aferoj, S-ro Sokal, Reprezentanto de la pola Registaro en la Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo kaj Pastro Woycicki, Prezidanto de la Komisiono de Laboro de la pola Parlamento. Akceptis ilin Sir Eric Drummond, Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj kaj S-ro Albert Thomas, Direktoro de la Internacia Labora Oficejo.

Post la prezento de la akto de konfirmo al Sir Eric Drummond, S-ro Albert Thomas dankis al la reprezentantoj de la pola Registaro pro la valora apogo donita de tiu Registaro al la Internacia Labora Organizaĵo, kaj atentigis pri la signifo de la samtempa konfirmo de tiom da Konvencioj en la nomo de ŝtato de tioma industria graveco kiel Pollando.

La dektri Konvencioj ampleksas: tri balotitajn de la Unua Kunsido de la Konferenco en Washington, nome, tiujn pri senlaboreco, pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al industria laboro, kaj pri nokta laboro de junuloj en industrio; tri balotitajn de la Dua Kunsido en Genova, nome, la Konvenciojn pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al marŝipa laboro, pri kompenspago por senlaboreco okaze de ŝippereo, kaj pri la dungigo de maristoj; kaj sep balotitajn de la Tria Kunsido en Genève, nome, la Konvenciojn pri la minimuma aĝo por allasi infanojn al laboro en agrikulturo, pri la rajtoj de kamplaboristoj je asociado kaj unuigo, pri kompenso por laborakcidentoj en agrikulturo, pri la uzo de plumboblanko en pentrado, pri semajna tagripozo en industriaj entreprenoj, pri la minimuma aĝo por allasi junulojn al laboro kiel hejtistoj kaj karbordigistoj kaj pri deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj okupataj surŝipe.

---

## Konsila Komitato pri Industria Higieno.

La Konsila Komitato pri Industria Higieno de la Internacia Labora Oficejo kunvenis en Genève, la 15-an de Julio.

Tiu Komitato, kiu konsistas el teknikaj spertuloj, estis starigita en 1921, rezulte el propono de la Unua Kunsido de la Internacia Labora Konferenco (Washington, 1919). La Oficejo konsultas la membrojn de la Komitato de tempo al tempo, precipe per korespondo, kaj iafoje per kunvoko de kunvenoj.

La kunvenon de la 15-a de Julio ĉeestis spertuloj el la jenaj landoj: Aŭstrio, Belgio, Francio, Germanio, Granda Britlando, Italio, Japanio, Pollando kaj Jugoslavio. La celo de la kunveno estis la ekzameno de diversaj demandoj pri industria higieno kaj patologio, kiel karbunkola infekto, la alsimiligo de industriaj malsanoj al akcidentoj laŭ la vidpunkto de kompenspago kaj la preparaj enketoj rilataj al unuformaj proviloj pri kolorvidado por fervojistoj kaj maristoj.

La kunsido de la Komitato daŭris tri tagojn. Diversaj proponoj estis faritaj pri la desinfekto de haro, kornoj kaj hufoj, kaj pri la protekto de laboristoj en iuj profesioj kontraŭ la danĝero de karbunkola infekto.

Pri kompenspago, la Komitato esprimis la opinion, ke laboristoj trafitaj de iuj malsanoj, de kiuj ĝi redaktis liston, devas rajti kompenson almenaŭ egalan al tiu, kiun ili ricevus okaze de industriaj akcidentoj.

La Komitato ankaŭ esprimis sian opinion pri la funkcioj de kuracistoj en laborinspektado kaj difinis la principojn sur kiuj devas esti bazita iu projekto por perioda kuracista ekzameno de laboristoj en malsanigaj laboroj.

---

## Nordena Migrado de la Negro en Usono.

De 1880 ĝis 1910 la centro de la negra loĝantaro de Usono moviĝis konstante sudokcidenten kaj en la due nomita jaro troviĝas en nordorienta Alabama. De 1910 ĝis 1920, tamen, okazis absoluta returniĝo je direkto, kaj en la lastnomita jaro la centro troviĝis en nordokcidenta Georgia, pli norde ol en 1880, sed ne tute tiel okcidente.

La senpera kaŭzo de tiu nordena moviĝo estas la manko de laboristaro en nordaj industrioj, rezulte el la mondmilito, kaj ĝi estas plie stimulita de la rezultatoj de la limiga politiko pri enmigrado.

La tuta nombro da sudnaskitaj negroj en la nordo ĉe la entabeligo de loĝantaro en 1920, estis 737.423, kaj en la okcidento 43.371. Kompense, 47.223 negroj naskitaj en la nordo aŭ la okcidento estis migrintaj suden, tiel ke la pura perdo al la sudo estis 733.571, aŭ 8,2 procentoj de la tuta negra loĝantaro de la sudo. En 1920, nur 27 procentoj de la loĝantaro de la sudaj ŝtatoj estis negroj, kompare kun 36 procentoj en 1870.

La nordena migrado de negroj en la jardeko de 1910 ĝis 1920 estis pli ol iam antaŭe el la ekstrema sudo, tio estas, el kotonproduktantaj ŝtatoj. En la nordo la negroj iras precipe en la urbojn. Tiel la negroj konsistigas 2,3 procentojn el la loĝantaro de la nordo, sed 4 procentojn el la loĝantaro de Chicago, Cleveland, kaj iuj aliaj urboj, 6 procentojn el tiu de Pittsburg, 7 procentojn el tiu de Philadelphia, 14,2 procentojn el tiu de Kansas-City. Eĉ pli grandaj proporcioj troviĝas en iuj pli malgrandaj urboj.

En la sudo 57,7 procentoj el la negra loĝantaro okupiĝas pri produktado de kotono kaj aliaj agrikulturaj produktoj, sed en la nordo nur 5,7 procentoj okupiĝas pri agrikultura laboro. La granda plimulto okupiĝas pri doma aŭ persono servado aŭ kiel nelertaj aŭ duonlertaj laboristoj. Ili troviĝas tamen en preskaŭ ĉiuj okupadoj. La statistikoj montras, ke estas precipe la lasttempe migrantaj negroj, kiuj fariĝis industriaj laboristoj, okupataj en fabrikejoj prefere ol en hoteloj, restoracioj, kafejoj kaj kuirejoj. Kompense, la plimulto el la negraj laboristinoj okupiĝas ankoraŭ precipe pri doma kaj persona servado.

La naskiĝado de la negroj estas pli malalta en la nordo o. en la sudo, kaj la mortado pli alta, tiel, ke la jara plimultiĝo estas pli malgranda en la nordo ol en la sudo. Tiuj kondiĉoj tamen povas esti nur kelkatempaj.